

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. N°3



## Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №3 (281)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redaktas:** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj:** Peter Baláž, István Ertl, Paweł Fischer-Kotowski, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Retpoŝtaj adresoj:** sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

**Retejoj:** <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

**Perantoj.** Vidu la liston sur p. 69-70.

### Abontarifo por 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

### Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represoj:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №3 (281).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 5 марта 2018 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	2
En ĉi tiu numero .....	3
<b>Temo</b> .....	<b>5</b>
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. NDK sub lupeo .....	6
<b>Eventoj</b> .....	<b>12</b>
Maritza Gutiérrez. Amerikanoj kongresis en Kubo .....	13
Ilona Koutny. Vintra interlingvistika sesio en Poznano .....	14
ESF liveras universitatan subtenon .....	15
Irina Gonĉarova. De AMO al APERo .....	16
Irina Gonĉarova. Revolucia APERo-12 .....	18
Nikolao Gudskov. Ni trovu la lastajn adresojn de pereintoj .....	20
ReVe: Renkontiĝo Vegana en Greziljono .....	21
Mirejo Grosjean, Stefan MacGill. Seminarioj de ILEI en Madrido kaj Kotonuo ..	22
Nekrologoj .....	22
Koncize (13 informoj) .....	23
<b>Tribuno</b> .....	<b>24</b>
Internacia Tago de la Gepatra Lingvo .....	25
Gary Mickle. Malnovaj hipotezoj rearmigitaj por la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo .....	26
Ekaterina "Miri" Lozina. EVS-volontulado por Esperanto – unika ŝanco .....	27
<b>Arkivo</b> .....	<b>29</b>
Carlo Minnaja. La participa demando .....	30
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en marto 2018 .....	41
<b>Lingvo</b> .....	<b>42</b>
Věra Barandovská-Frank. Tutmondiĝo de portugala kulturo kaj lingvo: Kien nun, kreoloj? (1) .....	43
<b>Kulturo</b> .....	<b>54</b>
Bella Aĥmadulina. "Dum pluraj jaroj de sur mia strat'..." (Tradukis Ludmila Novikova) .....	55

Anna Aĥmatova. Vespere (Tradukis Ludmila Novikova) .....	56
Marina Cvetajeva. "Kontentas mi – vi revas ne pri mi..." (Tradukis Ludmila Novikova) .....	56
Veronika Tuŝnova. "Fidelas amon la anim'..." (Tradukis Ludmila Novikova) .....	57
Julian Modest. Patrino: Rakonto .....	58
Novaj libroj de Julian Modest .....	60
Halina Gorecka. Promene tra <i>Beletra Almanako 2017</i> .....	61
Nikolao Gudskov. Malgranda ĉarma klasikaĵo (Recenzo: Aleksandr Saĥarov. <i>Superforta ambicio</i> ) .....	63
Paŭlo Moĵajevo. JoMo invitas al la okcitana karnavalo (Recenzo: <i>jOmO okcitanas</i> ) .....	64
Nova libroserva retejo en Germanio .....	65
Halina Gorecka. Literatura konkurso Liro-2017 .....	66
Ricevitaj gazetoj .....	66

## **Mozaiko .....** **67**

István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj .....	68
Kiel aboni <i>La Ondon</i> .....	69

Kvankam ankoraŭ vintro persistas en Kaliningrado, baldaŭ ankaŭ al ni venos printempo, la nekutime abunda neĝo degelos, kaj vidiĝos galantoj. Modestaj, sed belaj heroldoj de printempo. Ne pluku ilin, prefere nur fotu, se vi volas, ke viaj nepoj povu ĝui ekvidon de ili.

### Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Librojl/Librojl.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

## NIA DILIGENTA KOLEGARO

HALINA  
GORECKA  
ALEKSANDER  
KORJENKOV



En la ĵus eldonita enciklopedio *Nia diligenta kolegaro* (NDK) estas biografioj de ducent eminentaj esperantistoj ekde Zamenhof kaj aliaj pioniroj ĝis nuntempaj elstaruloj en la sferoj de movadorganizo, informado, instruado, scienco, esperantologio, literaturo, muziko, teatro, eldonado, redaktado, radio, interreto, komerco, turismo k. a. Vidu en la sekvaj paĝoj la nomliston kaj la resuman statistikon pri la nova enciklopedio.

# NDK sub lupeo

## Ducent nomoj

**A** Eŭgeno Aisberg, André Albault, Nikola Aleksiev, Ernest Archdeacon, William Auld

**B** Julio Baghy, Bakin, Hans Bakker, Peter Balaž, Lucien Bannier, Krešimir Bar-kovič, Anna Bartek, Norbert Barthelmess, Louis Bastien, Gersi Alfredo Bays, Louis de Beaufront, Belka Beleva, Vilmos Benczik, Paul Berthelot, Gerrit Berveling, Detlev Blanke, Ignat Bociort, Émile Boirac, Jevgenij Bokarev, Jean Borel, Werner Bor-mann, Marjorie Boulton, Carlo Bourlet, Dalibor Brozović, Odo Bujwid, Osmo Buller, Adolf Burkhardt, Montagu Christie Butler

**C** Jorge Camacho, Giorgio Canuto, Théophile Cart, Gabriel Chavet, Chen Yuan, Clelia Conterno-Guglielminetti, Renato Corsetti, Andreo Cseh

**Ĉ** Theodor Ĉejka, Petras Ĉeliauskas

**D** Aleksandras Dambrauskas, Dao Anh Kha, Probal Dasgupta, Fernando de Diego, Johannes Dietterle, Roman Dobrzyński, Isaj Dratwer, Hilda Dresen, Ernest Drezen, Michel Duc Goninaz

**E** Leopold Einstein, Kep Enderby, Stellan Engholm, Vasilij Erošenko, István Ertl

**F** Károly Fajsz, Mark Fettes, Gian Carlo Fighiera, Ada Fighiera-Sikorska, Srđan Flego, Joan Font i Giralt, Jean Forge, Jerzy Fornal, Helmar Frank

**G** Lina Gabrielli, Claude Gacond, Koffi Gbeglo, Jadwiga Gibczyńska, Bernard Golden, Cecil Goldsmith, Ismael Gomes Braga, Albert Goodheir, Antoni Grabowski, Rudi Graetz, Ursula Grattapaglia, Mireille Grosjean, Émile Grosjean-Maupin, And-zej Grzębowski

**Ĝ** Marinko Ĝivoje

**H** Rudolf Haferkorn, Hajpin Li, Marie Hankel, Ralph Harry, Reinhard Haupent-hal, Hector Hodler, Harry Holmes, Hu Yuzhi

**Ĥ** Nikolaj Ĥoňlov

**I** Vicente Inglada Ors, Magomet Isajev, Jan Isbrücker, Itô Kanzi

**J** Hans Jakob, Émile Javal, Povilas Jegorovas, Theodor Jung

**K** Kabe, Kálmán Kalocsay, Stanislav Kamarýt, Dennis Keefe, Christer Kisel-man, Lajos Kökény, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Robert Kreuz, Hans Kürsteiner

**L** Valdemar Langlet, Eŭgeno Lanti, Ivo Lapenna, Jacques Le Puil, Jean-Marc Leclercq, Lee Chong-Yeong, Pál Lengyel, Li Shijun, Jouko Lindstedt, Ulrich Lins, Francisko Valdomiro Lorenz, Heinrich Luyken

**M** Stefan MacGill, Grégoire Maertens, Duilio Magnani, Jacques-Louis Mahé, Carmel Mallia, Ernfrid Malmgren, Stano Marček, Perla Martinelli, Floréal Martorell, Geraldo Mattos, Stefan Maul, John Merchant, Alfred Michaux, Georgi Mihalkov,

Simo Milojević, Carlo Minnaja, Miyamoto Masao, Tiberio Morariu, Harold Bolingbroke Mudie

**N** György Nanovfszky, Paul Neergaard, István Nemere, Nguyen Van Kinh, Paul Nylén

**O** Jaan Ojalo, Violin Oljanov, Ionel Onet

**P** Paul Peeraerts, Vasil Peevski, Émile Peltier, Karolo Piĉ, Barbara Pietrzak, Claude Piron, Božidar Popović, Aleksandr Postnikov, Edmond Privat

**R** Baldur Ragnarsson, Juan Régulo Pérez, Maurice Rollet de l'Isle, Reto Rossetti

**S** Victor Sadler, Aleksandr Saĥarov, René de Saussure, Raymond Schwartz, Hippolyte Sebert, Tibor Sekelj, Vilho Setälä, Gurgun Sevak, Giorgio Silfer, Lakshmiswar Sinha, Anakreon Stamatiadis, Trevor Steele, Hugo Steiner, Eduard Stettler, Petro Stojan, Carl Støp-Bowitz, Sándor Szathmári, István Szerdahelyi, Ferenc Szilágyi

**Ŝ, Š** Ivan Ŝirjajev, Spomenka Ŝtimec

**T** Zlatko Tišljar, Humphrey Tonkin, Wilhelm Heinrich Trompeter

**U** Dreves Uitterdijk, Eli Urbanová

**V** Henri Vallienne, Vladimir Varankin, Bruno Vogelmann

**W** Gaston Waringhien, John Wells, Egidius Wensing

**Y** Yagi Hideo, Ye Laishi

**Z** Ludoviko Zamenhof, Eugène de Zilah, Peter Zilvar, Milan Zvara

**Ž** Walter Źelazny

La listo estis kolektive kompilita kaj modifita laŭ la graveco de la kontribuo de ĉiu konkreta persono, ne laŭ ties sekso, aĝo, nacia aŭ ŝtata apartenoj. Sed tuj post la eldono (kaj eĉ antaŭ la eldono!) multaj demandis nin: kiom da viroj kaj virinoj estas inter la eminentuloj? kiom el ili ankoraŭ vivas? kiuj plej longe okupiĝas pri Esperanto? en kiuj landoj ili vivis/vivas? ktp. La respondoj estas en la suba statistiko.



## Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Aperis en februaro 2018

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe UEA aŭ ĉe via kutima libroservo



Kiom de Lingvakomitaninoj en 1907?

## Tre malmultaj virinoj

En NDK estas registritaj 200 personoj: 183 viroj kaj nur 17 virinoj (nur 8.5%). Tio estas facile komprenebla, ĉar dum la unua jarcento de Esperanto nur malmultaj virinoj elstare aktivis movade, kulture aŭ fake. Vidu, ekzemple, la supran foton de la Lingva Komitato el 1907 aŭ la liston de la kunlaborantoj de la *Enciklopedio de Esperanto* kiu entenas la nomojn de 56 viroj kaj ... unu virino (Julia Isbrücker). Ĉi tiu proporcio pligrandiĝas laŭtempe: inter la 146 forpasintaj NDKanoj estas nur 9 virinoj (6,2%), sed inter la 54 vivantaj geaktivuloj estas 8 aktivulinoj (14,8%), kvankam ĝis nun neniu virino estis gvidanto de UEA, SAT kaj Akademio de Esperanto.

## Kiu plej frue naskiĝis?

La lingvon de Zamenhof eklernis diversaĝuloj, kaj en 1887 li, 27-jarulo, supozeble estis inter la junaj pioniroj, kaj la plej frue naskiĝinta NDKano estas ne li, sed Lōb "Leopold" Einstein, kiu naskiĝis la 28an de novembro 1833 en reĝlando Bavario. Sekvas lin tri naskiĝintoj en 1839: Wilhelm Heinrich Trompeter (22 jan 1839), Hippolyte Sebert (30 jan 1839) kaj Émile Javal (5 maj 1839).

**Ĝi estas demonstra versio de la 73-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



# Eventoj

AMO-44		
	<b>Junigo kaj modernigo de Esperanta movado en Rusio</b>	
<b>AMo.RU</b> La unua tutrusia seminario pri la aktivula maturigo. REU, MEA MASI		<b>AMO-44</b> Sub aŭspicio de UEA 20-23.02.2018 Jerŝovo Rusio

La 44a Seminario pri Aktivula Maturigo, okazinta en februaro apud Moskvo (vd. p. 16-18), iĝis la unua AMO-seminario de kaj por aktivuloj el MEA MASI kaj REU por diskuti la problemojn pri la modernigo kaj junigo de la landa movado. Ĝi ricevis la kromnomon AMo.RU. La sukceso instigas la organizintojn de AMo.RU-1 pensi pri AMo.RU-2.

## Amerikanoj kongresis en Kubo

De la 11a ĝis la 17a de februaro 2018 okazis en la hotelo "Panamericano" en Havano (Kubo) la 9a Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE), kiun partoprenis 232 kongresanoj el dudek landoj. La solenan malfermon en la teatro de la nacia muzeo pri belartoj ĉeestis la vicministro pri kulturo kaj alta protektanto Fernando Rojas, nome de UEA d-rino Sara Spanó kaj nome de TEJO ties vicprezidanto Francesco Maurelli.

La kongresa temo "Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj" havis entute kvar sesiojn. Kvankam la kongreso ne rezoluciis pri la demando starigita de la kongresa temo, tamen pere de "Principa Deklaro" ĝi renovigis la sintenon de la Esperanto-movado pri tiu ĉi demando kaj konfirmis, ke la partoprenintoj de la 9a TAKE emfazas la bezonon de tio, ke la Esperanto-komunumo pli proksimiĝu al la nuntempaj demandoj starigitaj en la Tagordo 2030 de Unesko, pri kiu Kuba Esperanto-Asocio havas apartan intereson cele al tio, ke ĝiaj membroj kaj aktivuloj sentu ke Esperantujo estas vera edukejo.



La kuba junulo Javier Lamos Nistal prelegas pri Esperanto en la interreta mondo (Foto: Jeong-ok Song)

*Banano* prezentis *La krediton*; koncertis *Amindaj* el Santiago de Kubo kaj la ensemblo de alternativa muziko *Kialo* el Havano. Inter la tradiciaj programeroj estis prelegoj, prezentoj, kunsidoj, la 43a sesio de AMO-seminario, UEA/ILEI-ekzamenoj kaj ekskursoj.

Elstaris la gazetara eĥo en la naciaj radio kaj televido, kiuj dum la tuta semajno raportis kaj reklamis en diversaj momentoj, krom la aktivado en sociaj retoj.



Tiu edukejo unue celas disvastigi Esperanton kaj la konscion pri la valoroj de la lingvo kiel kultura trezoro kaj por defendo de la gepatra lingvo; kaj la asocia laboro ankaŭ celas la lingvan justecon, kiu kontribuu al lingva ekvilibro, kies sekvoj bone efikos al konservado de diverseco de kulturoj kaj mondovizioj, ĉar tia diverseco garantias pli bonan kaj kvalitan vivon por la sano de nia planedo. Tiuj estas edukaj bazoj por survoji al daŭrigebla evoluo, kiu kontentigu la bezonojn de la nunaj kaj estontaj generacioj.

La kongresa programo inkluzivis naciajn kaj internacian vesperojn, teatraĵojn de kubaj aŭtoroj kiel Emelina Cundiamor kaj Franciska kaj *La Morto*. La teatro *Verda*

**Maritza Gutiérrez**



## Vintra interlingvistika sesio en Poznano

La 7a grupo de la Interlingvistikaj Studoj en la universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano (pri kies 20-jariĝo ni raportis en oktobro), daŭrigis sian laboron dum la vintra sesio la 3-10an de februaro. Alvenis 14 gestudentoj el dek landoj (Ĉinio, Koreio, Brazilo, Usono, Turkio, Ruslando, Francio, Hispanio, Germanio kaj Pollando) kaj pruvis, ke pere de esperanto tre bone progresas interkultura komunikado. Post la konsultiĝo kaj ekzamenoj, lunde komenciĝis la kursoj de la dua semestro: Michael Farris prezentis la ĝeneralajn regulojn de morfologio kaj sintakso eluzante la sciojn de la diverslingva partoprenantaro. Lidia Ligęza kaj Tomasz Chmielik enkondukis ilin en la duan periodon de la esperanta literaturo.

La multkultura konsisto de la grupo donis fekundan bazon al Ilona Koutny por trakti diversajn flankojn de komunikado. La studentoj praktike povis kompari la diversajn komunikutimojn kaj korpolingvaĵojn, prezenti siajn kaj deĉifri la aliajn, malkovri kio estas komuna kaj kio estas malsama. Ŝi gvidis kurson ankaŭ pri esperanta gramatiko, prezentante la periodojn de nia lingvo kun bazaj dokumentoj. La interesiĝemaj studentoj povis ekkoni kaj diskuti la problemojn de esperanta morfologio, inkludanta la fifaman radikkarakteron.

La varma etoso montriĝis ankaŭ dum la komuna vespero. La sesion sekvis ekskurso al Toruno, kie post urborigardado kaj vizito de *Studio P* en la Junulara Kulturdomo (kun esperantlingva filmita spektaklo), Maria Pokrzywnicka prezentis en la Etnografia Muzeo la ĉiutagan vivon el la epoko de Zamenhof, regalis la gestudentojn per mielkuko kaj ludigis ilin kadre de la interkultura karnavala renkontiĝo.

**Ilona Koutny**, gvidanto de la Studoj  
<http://www.amu.edu.pl/~inter/>

## ESF liveras universitatan subtenon

Signifa donaco de ESF (Esperantic Studies Foundation) helpis certigi la estontecon de studoj pri Esperanto kaj interlingvistiko ĉe unu el ĉefaj nederlandaj universitatoj. La tuta sumo de 27.000 USD (21.700 eŭroj), donacita al la Universitato de Amsterdamo de UEA, estos uzata por certigi la estontecon de la katedro pri Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo.

“Por usonaj universitatoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj rilataj fenomenoj”, – komentis Humphrey Tonkin, prezidanto de ESF, “la amsterdama katedro estas brila ekzemplo de tio, kion oni povas atingi en intelekto malferma medio, kie lingvistikaj fenomenoj estas serioze pritraktataj. La fakto, ke Esperanto kaj interlingvistiko estos daŭre reprezentataj en Amsterdamo, helpos plifortigi studojn en tiuj ĉi kampoj ankaŭ aliloke”.

La katedro, nun okupata de profesoro Federico Gobbo, Italio, havas longan kaj elstaran historion. Ĝi komenciĝis iom post la Dua Mondmilito kiel lektorato, kiu poste transiris al la statuso de privata profesoreco ĉirkaŭ dudek jarojn poste. Esperanto kaj interlingvistiko, kutime instruataj kiel branĉo de lingvistiko, inkluzivas la studon de planlingvoj kaj ilia socia kaj lingvistika kunteksto.

“Ni estas tre dankemaj pro tiu ĉi malavara donaco de ESF”, diris Mark Fettes, prezidanto de UEA. “Tiu ĉi donaco estas parto de malavara subteno de organizoj kaj individuaj Esperantistoj ĉirkaŭ la mondo, kaj ĝi atestas kaj pri la vivopovo de la Esperanto-komunumo, kaj pri Esperanto kiel esplorobjekto”.

**ESF**



# SES-2018

Somera Esperanto-Studado  
Liptovský Mikuláš, Slovakio  
14-22.07.2018  
[ses.ikso.net](http://ses.ikso.net)



## De AMO al APERo

La 20-22an de februaro en la apudmoskva ripozejo Jerŝovo okazis AMO-Seminaro – Seminario pri Aktivula Maturigo. Ĝi pasis sub la aŭspicio de UEA kiel ĉenero de la primovadaj seminarioj tra la tuta mondo. Laŭ la UEA-registro ĝi havis la 44an numeron. Sed por nia grandega lando ĉi tiu AMO estis la unua provo okazigi seriozan primovadan laborkunvenon pri la evoluo de la Rusia Esperantujo. La temo de nia AMO estis superaktuala (kaj supermalfacila): “Modernigo kaj junigo de la Rusia Esperanto-movado”.

Estis ja malfacile kolekti reprezentantojn de ĉiuj ok federaciaj regionoj dum labortagoj. Tempon por longdistancaj vojaĝoj havas pensiuloj, sed ili ne havas monon. Tiuj, kiuj povas permesi al si la vojelspezojn, tiutempe devas labori. Kaj nia celgrupo – studentoj – havas nek monon (ĉar ne laboras), nek tempon (ĉar studas). Senelira situacio, ĉu? Nur ŝajnas. Agu – kaj vi atingos.

AMO-44 kunigis 15 homojn el kvar federaciaj regionoj: dek el la Centra (Moskvo kaj Moskva regiono), po du el la Nord-Okcidenta (Sankt-Peterburgo kaj la Granda Novgorodo) kaj Suda (Novoĉerkasko kaj Volgogrado), unu venis de la plej Esperanto-prospera Urala regiono (Jekaterinburgo). La aĝo de sep partoprenintoj estis malpli ol 41 jaroj, la plej juna havis 13; 8 inoj kaj 7 viroj – por kompletigi la statistikon. Sed, eble, plej gravas, ke inter la ĉeestintoj estis kaj spertegaj, kaj komencantaj aktivuloj (la sola laborlingvo estis Esperanto). La seminarion organizis Moskva Esperanta Asocio MASI en intima kunlaboro kun Rusia Esperantista Unio. Partoprenis naŭ REU-membroj (inter kiuj kvar estraranoj de REU) kaj ok membroj de MEA MASI. Do, formiĝis tre proporcia kaj tre laborema amika kolektivo, kies ĉiufankaj avantaĝoj tuj montriĝis. Kaj dum la laboro eĉ formiĝis sento, ke por la unua AMO en niaj kondiĉoj bezonatas nek pli da homoj, nek alia homkonsisto.

Vespere la 20an de februaro, post la afereca malfermo, kie estis elektita la konstanta protokolanto de AMO-44 (Kirill Noviĉenko), komenciĝis la prepara parto de la programo: la seminario de Irina Gonĉarova “Kio estas tiu ĉi AMO por ni”. Ni spektis ankaŭ lumbildprezentadon de la prezidanto de REU Svetlana Smetanina pri la aktuala stato de la Esperanto-movado en la lando.

En la sekva, kerna, tago de la programo (21.02), okazis la kvarhora seminario “Kio estas rusia esperantistaro kaj kia estu ĝia estonto”, gvidita de Irina Gonĉarova laŭ la metodo de la tradicia por multaj AMOj: FLAM-analizo de la nuna situacio kaj EKEK-solvoserĉado “Kiel plibonigi la situacion en Rusio”.

**Ĝi estas demonstra versio de la 73-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

Vicprezidanto de TEĴA k de Litova E-Asocio, konata litova ĵurnalisto k e-isto Audrys Antanaitis iĝis prezidanto de ŝtata komisiono pri la litova lingvo. (Vytautas Ŝilas)

Dum la tuta februaro en la Kulturdomo de Guardamar del Segura (Valencilando, Hispanio) estis montrata ekspozicio pri Eo kun la paneloj kreitaj de Hispana E-Federacio plus du speciale kreitaj por tiu ĉi ekspozicio pri la E-pioniro Ricardo Codorniu, kiu fine de sia vivo disvolvis gravan aktivadon en ĉi tiu urbo. (La Bitbulteno)

3 feb 2018 finiĝis kurso de Eo ĉe Masaĉuseca Instituto de Teknologio, unu el la plej prestiĝaj politeknikoj en la mondo; la kurso, gvidita de Francesco Maurelli, konsistis el 11 kunvenoj: prezento de Eo, ok lecionoj pri la lingvo, seminario pri E-muziko, seminario pri E-literaturo. (Landa Agado)

28 feb 2018 Giorgio Silfer gvidis seminarion pri la Ea literaturo en Instituto Nacia por Lingvoj Indiĝenaj en Meksikurbo. (HeKo)

Dum la unua jaro de la projekto "Ekparolu!" okazis 700 parolsesioj, en kiuj partoprenis 103 genevoj k 58 geonkloj el 41 landoj; la plej aktiva estis Jean-Jacques Wintraecken el Nederlando, kun 68 duonhoraj parolsesioj. (Edukado.net)

La estraro de Fondumo Esperanto atribuis al Kalle Kniivilä monpremion de mil eŭroj kiel rekonon de lia valora kontribuo al la Ea fakliteraturo per la raportaj libroj *Homoj de Putin*, *Krimeo estas nia*, *Idoj de la imperio* k *La strato de Tanja*, kiuj ricevis premiojn k laŭdojn en Svedio, Finnlando k internacie; Kniivilä verkas siajn librojn trilingve: finne, svede k Ee. (EAF-agadas)

En la dua voĉdonado de la Komitato de UEA pri la posteno de Ĝenerala Sekretario de UEA Aleks Kadar ricevis 33 voĉojn, Orlando Raola ricevis 14 voĉojn, sekve Aleks Kadar estas elektita. (UEA-membroj)

En 2017 la libroservo de UEA vendis varojn por ĉ. 70 mil eŭroj; en la listo de la plej multe venditaj libroj plej alte estas la nova eldono de la *Pasporta Servo* kun 375 venditaj ekzempleroj, sekvas *Poŝamiko* de B. Allée & K. Kováts 189 ekz., *Fundamento de la homaj rajtoj* 168 k la nova eldono de *La danĝera lingvo* de U. Lins 122 ekz. (Esperanto)

La brazila eldonejo Temática eldonis la libron *O Esperanto além da língua* (Eo trans la lingvo), kiu estas kolekto da eseoj verkitaj de pluraj aŭtoroj pri diversaj lingvaj k kulturaj aspektoj de la Internacia Lingvo. (Esperanto Ilustrita)

En februaro aperis papere k elektronike, la lasta numero de *Rusia Esperanto-Gazeto* (REGo), №6 (103), decembro 2017; ekde 2018 REGo ne plu aperos. (Landa Agado)

Je 1 mar 2018 al la 103a UK de Eo en Lisbono aliĝis 1157 e-istoj el 65 landoj; plejmulte el Francio 207, Germanio 95, Brazilo 79, Japanio 70, Pollando 69, Hispanio 52, Belgio 41, Koreio 36, Italio 32, Litovio 30, Ruslando 30, Britio 29, Usono 29, Nederlando 28, Portugalio 27. (uea.org).

124 personoj kunvenis en Transjara Kurskunveno de Eo, aranĝita de E-Populariga Asocio de Oomoto en Kameoka (Japanio); inter ili estis 53 koreoj k 10 nepalaj lernantoj. (Esperanto en Azio kaj Oceanio)

Fine de februaro 2018 Meksika E-Federacio estis eksigita el la Ea Civito, ekde la 1a de marto 2018 Luis Raudón oficas kiel prefekto por Meksiko. (HeKo)

# *Tribuno*



**Malgraŭ tio, ke “La Fina Venko” ankoraŭ estas nur en estonteco, la eblo vivi en Esperantujo jam ekzistas. Multaj homoj scias, ke ekzistas ebloj volontuli ĉe Esperanto-organizoj. Nuntempe estas kvar ebloj fari tion pere de la Eŭropa Volontula Servo de la Eŭropa Unio: en Slovakio (E@I), Pollando (Bjalistoka Esperanto-Societo) kaj du en Nederlando ĉe UEA kaj TEJO. (Vd. p. 27-28)**

# Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

La 21an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako (Orienta Banglujo), ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo, la bengala, kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo “pli granda”, parolata de la fortuloj de tiu momento.

La 17an de novembro 1999 Unesko proklamis la 21an de februaro la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. En 2007 ankaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj alvokis la membroŝtatojn por “Antaŭenpuŝi la konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la popoloj de la mondo”, samtempe deklarante la jaron 2008 Internacia Jaro de Lingvoj. En 2014 Unesko aperigis en sia retejo ankaŭ Esperanto-lingvan version de la mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro, Irina Bokova.

Kiel rilatas al ĉio ĉi Esperanto? La kernaj valoroj de ĉi tiu tago, la diverseco kaj la rajto de ĉiu homo paroli sian gepatran lingvon, estas ankaŭ la valoroj, kiujn la tutmonda movado por Esperanto defendas. Ni, la esperantistoj, volas neniun lingvon malaperigi, ni volas, ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj regu lingva justeco en la inter-komunikado. Ĉi-cele, de multaj jaroj, Universala Esperanto-Asocio (UEA) solene kunfestas ĉi tiun tagon, interalie por substreki, ke la internacia lingvo Esperanto ne estas eliminanto de lingvoj, kia estas lingvo de granda ekonomia kaj militista potenco.

Esperanto fakte estas protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj, kiel diris s-ino Vigdís Finnbogadóttir (prezidento de la Respubliko Islando inter 1980-1996): “Estas jam tempo ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povus iĝi vera remparo por iliaj kulturoj kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj, kiel hodiaŭ tio pli kaj pli evidentiĝas. Mi sincere esperas, ke Esperanto rapide progresos por helpi ĉiujn naciojn de la mondo.

Eble iu ankoraŭ demandas: “Kial ĝuste Esperanto?”. La kialo estas simpla. Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj interesoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas nur bonvolaj homoj el plej diversaj popoloj, nacioj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en paco inter ĉiuj popoloj. “Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiu lingvo estas la celo, al kiu esence kontribuas Esperanto.” (Prof. Robert Phillipson). Esperanto estas ilo akcelanta atingon de justa komunikado kaj tiel de justaj rilatoj inter etnoj, kulturoj, popoloj. “... Mi esperas, ke Esperanto daŭrigos la plenumadon de tiu duflanka rolo subtenante diversecon kaj kreante unuecon.” (Rita Izsák-Ndiaye, Speciala Raportisto de UN).

Sekve, la uzo de la ponto-lingvo Esperanto en internacia komunikado realigas lingvan egalrajtecon kaj helpas ĉiujn pluvivigi sian lingvon. Ĉi tiu estas la klara mesaĝo, kiun Esperanto-parolantoj el la tuta mondo volas sendi al ĉiuj tutmonde la 21an de februaro.

**GK UEA**



# Malnovaj hipotezoj revarmigitaj por la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo



UEA markis tiun tagon, kiel en pasintaj jaroj, per deklaro disvastigita en sia retejo kaj multaj dissendolistoj. Tiu reuzas la disfaleman argumenton, ke Esperanto estas “protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj”, ĉar malantaŭ ĝi “ne estas ŝtatoj, ekonomiaj interesoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj”, sed “bonvolaj homoj”. Tial ĝi “helpas ĉiujn pluvivigi sian lingvon”.

Nu, malantaŭ Esperanto estas laŭ realismaj taksoj kelkaj dekmiloj da homoj, kaj por la granda plimulto el ili ĝi ne estas la plej ofte uzata lingvo en la ĉiutageco. Kompreneble ĝi ne konstateble altigas aŭ malaltigas la travivo-ŝancojn de etnaj lingvoj kaj kulturoj.

La deklaro citas iaman prezidenton de Islando, Vigdís Finnbogadóttir, kiu diris – ĉu eble post suflorado? – ke “neŭtrala lingvo povus iĝi vera reparo” por la naciaj kulturoj “kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj”. Efektive, oni foje imagas, ke Esperanto iel savus etnajn lingvojn kaj kulturojn kontraŭ pereado, se ĝi situus pinte de la tutmonda lingvo-hierarkio, anstataŭinte en tiu rolo la anglan. Ĉi-specaj reklamtekstoj ne vere klarigas, kiel tiu miraklo okazus. Ili ofte vagas tien kaj reen inter du tute apartaj temoj: kiel Esperanto laŭimage kondukus respektive aliajn lingvojn, se ĝi estus tre vaste uzata, kaj kiel la nuntempaj malmultaj esperantistoj (kies faktan idean diversecon ĉi-rilate oni prisilentas) sintenas pri lingvo-demandoj. En la fino nek tiu nek la alia temo estas konvinke traktitaj.

La “miraklo-teorio” ŝajnas ne plu inspiri la Esperanto-parolantojn. De kelkaj jaroj oni nur sporade renkontas ĝin. Plej ofte oni en la ekstera informado emfazas la efektive vivatan realon de la lingvo. Ĉu tiu lingvopolitika filozofio, al kiu kelkaj movadaj pintuloj plu kroĉas sin, sufiĉe konvinkas la esperantulojn mem, malgraŭ ties kutime idealisma, politikema inklino? Aŭ ĉu ne multaj bojkotas ĝin pro timo ne povi demonstri ĝian pravon, se defiate fari tion? Lu von Wunsch-Rolshoven realecproksime proponas elstarigi okaze de ĉi tiu tago dediĉita al gepatraj lingvoj la fakton, malmulte konatan en la “ekstera mondo”, ke ankaŭ Esperanto estas gepatra lingvo. Tio vekas intereson kaj sen spekulativa teoriumado eksplodigas la miton, ke ĝi ne estas “vera lingvo”.

Gary Mickle

## **EVS-volontado por Esperanto – unika ŝanco**

Malgraŭ tio, ke “La Fina Venko” ankoraŭ estas nur en estonteco, la eblo *vivi en Esperantujo* jam ekzistas. Multaj homoj scias, ke ekzistas ebloj volontuli ĉe Esperanto-organizoj. Nuntempe estas kvar ebloj fari tion pere de la Eŭropa Volontula Servo (EVS) de la Eŭropa Unio: en Slovakio (E@I), Pollando (Bjalistoka Esperanto-Societo) kaj du en Nederlando ĉe UEA kaj TEJO. (Pli detale: <http://tejo.org/volontulado/>)

Kion faras volontuloj tie? Kompreneble, la ĉefa okupo estas labori por Esperanto kaj per Esperanto, ĉar teamoj estas vere internaciaj. Mi volontulas ĉe E@I en Slovakio kaj povas rakonti nur pri la laboro ĉi tie. La plej grava kaj ĉefa okupo estas tradukado de lernoretejoj kaj kunorganizado de eventoj. Krome eblas realigi siajn proprajn projektojn kaj multe vojaĝi. Indas diri, ke dum unu jaro oni ne havas faman Postrenkontiĝan Sindromon (t. n. PSR), oni ĉiam estas ene de senfina renkontiĝo. Tiel vi povas mem kontribui al Esperantujo kaj provi siajn kapablojn kiel helpanto antaŭ aŭ dum eventoj.

Eĉ se vi ne estas flua parolanto, vi povas iĝi volontulo por praktiki aŭ eĉ lerni la lingvon. Tamen volontuloj de aliaj EVS-projektoj en la sama lando plibonigas ĉefe sian kapablon paroli angle. Tio povas esti malavantaĝo por esperantistoj dum EVS-trejnadoj kaj renkontiĝoj (kiuj okazas kutime dufoje dum la jaro): vi ja devas paroli angle aŭ preskaŭ neniu komprenos vin. Ne nur esperantistoj povas havi problemojn pri la lingvo.

Dum nia trejnado mi kelkfoje aŭdis de aliaj volontuloj, ke ili komence ege hontis pri siaj paroleraroj kaj malĝusta prononco, sed bonŝance ĉiuj estis sufiĉe komprenemaj kaj atentemaj. Do se vi vere kontraŭas la anglan kiel la komunan lingvon de EVS, tio povas esti sufiĉe ĝena kaj nekomforta por vi kaj por aliaj partoprenantoj. Tamen, dum tiaj komunaj trejnadoj sentebblas sufiĉe Esperantuja etoso, ĉar renkontiĝas junaj homoj de diversaj landoj. Ĝenerale, volontuloj estas afablaj, amikemaj kaj interesaj personoj.

Sufiĉe ofte Esperanto-volontuloj pensas pri tiuj trejnadoj kiel pri deviga, neinteresa kaj malgrava afero. Por kelkaj foje estas tiel: oni povas ne ŝati etoson, trejnadojn kaj senti sin perdantaj tempon senutile (kio povas esti vera). Sed malgraŭ tio la renkontiĝoj povas iĝi bela ebleco ekkoni novajn homojn kaj trovi bonajn amikojn. Krome vi povas rakonti al ili pri la pli facila kaj neŭtrala internacia lingvo.

**Ĝi estas demonstra versio de la 73-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



*Lingva Konferenco en Arnhem. — Dum la paska libertempo okazis en la Esperanto-Domo en Arnhem internacia konferenco, en kiu oni diskutis pri diversaj problemoj de nia lingvo. Nia bildo montras grupon de la partoprenantoj, antaŭ la Esperanto-Domo. En la unua vico staras (de maldekstre): s-ro C. Rousseau L.K. (= ano de la Lingva Komitato) el Parizo, s-ro Karl Minor L.K. el Hamburgo, s-ino Yvonne Privat, D-ro Edmond Privat L.K., redaktoro de la gazeto „Esperanto” el Cenevo, f-ino Lucia Atlas el Bukareŝto, direktoro Delfi Dalmat el Barcelono, s-ro inf. J. R. G. Isbrücker Akademiano el Hago, s-ino Julia Isbrücker, Andreo Cseh kaj s-ro A. L. Moreau (Arnhem).*

La Internacia Lingva Konferenco, okazinta la 25-29an de marto 1932 en la Esperanto-Domo de Arnhem estis «...kvazaŭ libera “lingva parlamento” de la libera Esperantista publiko», kiu ne rajtis fari decidojn pri la lingvo, sed celis “fari rezoluciojn kaj dezirospimojn transdonotajn al la Akademio por pristudo kaj efektivigo”. La problemon pri la pasivaj participoj, aperintan en la konferenco, la Akademio solvis nur post 45 jaroj. Pli detale pri tio vi povas legu en fragmento el la baldaŭ aperonta libro de Carlo Minnaja pri la historio de la Akademio de Esperanto. (Foto el *La Praktiko*, 1932, №4).

# *La participa demando*

de Carlo Minnaja

La sekvanta eseo estas ĉerpaĵo el ĉapitro de la verko “Historio de la Akademio de Esperanto” de Carlo Minnaja, estro de la koncerna akademika komisiono. La libro, konsistanta el dek tri ĉapitroj, Referencoj, du apendicoj kaj ses indeksoj, estas nun ĉe la lasta stadio antaŭ la presado. Eldonas ĝin la Itala Esperanto-Federacio.

## 1. La starto

La akademika cirkulero 76, 3 feb 1965, verkita kiel kutime de la prezidanto Waringhien, mencias la neceson pri laboro ĉirkaŭ gramatikaj demandoj, “ekz-e la pasivaj participoj, la pronomoj *si* kaj *sia*, ktp...”.

Interesa estas la konsidero, ke pri la pasivaj participoj, ĝuste pri la demando *ata/ita*, estis jam diskuto dum la “Unua Lingva Konferenco” aranĝita de la Cseh-Instituto en 1932. Fine de tiu konferenco estis petite, ke la Akademio (tiam post submeto al la Lingva Komitato) faru decidon. Kiel tiama Direktoro de la Gramatika Sekcio<sup>1</sup>, Lippmann redaktis detalan raporton prezentotan al la samjara 24a UK en Parizo, en kiu li konkludis: “Fakte ne estas malfacile trovi la ĝustan formon: ĝi rezultas el simpla konstato de la efektiva *daŭro* de la ago (-ata se daŭranta, -ita se finita).” (Oficiala Raportaro, 1932, p. 91).

La raporto de Lippmann restis sen sekvo, kaj la afero restis dormanta. Ĉiu plu sekvis sian lingvan senton kaj neniam estis miskompreno aŭ malamikeco. Tamen la fajro releviĝis dudek jarojn poste: ekde 1953 Lapenna insistis, ke la Akademio devas alpreni decidon pri tiu punkto. Li trovis tamen ne tre varman akcepton fare de la tiama prezidanto Isbrucker kiu, en responda letero (22 okt 1953) tiel argumentis: “Mi povas certigi vin, ke laŭ mia kompreno de la signifo de -ita kaj -ata neniam povas esti iu dubo pri la senco: nur la aŭtoroj povas esprimi sin malĝuste.” Sed Isbrucker akceptis, ke oni diskutu pri tio dum la UK en Harlemono en 1954.

Abunda literaro de Lapenna, Régulo Pérez kaj aliaj, metis la demandon sur la relojn de la Zamenhofa stilo, kvankam ankaŭ alia uzado de la participoj estis same fidele Fundamenta. *La Zamenhofa Esperanto – Simpozio pri -ata/-ita* (Sta-feto 1961) estis kolekto de artikoloj, preskaŭ nur de akademianoj (dek el dek unu kontribuoj), pri la uzado de participoj. Komenciĝis tiam la “grandaj manovroj” por la akademiaj elektoj de printempo 1962, al kiuj ĉiu el la du partioj antaŭenpuŝis siajn kandidatojn. En diversaj privataj leteroj estis esprimita, en pli aŭ malpli alta grado, nekontento pri la mastrumado de la kandidatigoj fare de Isbrucker, kio fakte



antaŭanoncis deziron por nova prezidanto. Ekzemple Bugge-Paulsen (26 jan 1962) plendas, ke en la prezento de la kandidatoj al li estas dediĉitaj nur 9 linioj, dum “Rosbach estis regalita per 14, kaj Støp-Bowitz eĉ per 24 (konsiderinde pli ol ĉiu ajn alia)”. Tiu sama letero tuŝas konfidencan informon, kiu nun, pli ol 50 jarojn poste, povas esti diskonigata: same kiel por 1961, du norvegoj, ministrino Aase Bjerkholt kaj parlamentano Konrad Nordahl, prezidanto de la Landa Sindikataro Laborista, subskribis norvegan proponon al la Nobel-komitato doni pacpremion al Universala Esperanto-Asocio.<sup>2</sup>

La kampanjo por la baloto por la membroj en 1962 kaj tiu postajara por la estraro estis ege akraj, kaj pluraj leteroj superas la limojn de deco. Esprimoj kiel “kliko”, “intrigantoj”, “kontraŭfundamentistoj”, “jezuito”, “hipokriteco kaj intrigoj de la triopo X-X-X”, “hontinda skandala aranĝo en Y”, “sordida afero”, “komploto”, “la intelekta honesteco estas *rara avis*<sup>3</sup> en kelkaj rondoj”, “rasismo”, “mirinda monumento de hipokriteco”, “artifiko, kiu devus esti ekzorcita el la pia vivo de nia akademio”, “koterio de mensaj kanajloj kaj kokritoj”, “kanajla eŭnukaro”, “politika kanajleco” kaj multaj aliaj eĉ pli fortaj (kaj pli pitoreskaj) esprimoj kontraŭ iuj kolegoj, apogantoj de la atisma sistemo, troviĝas en leteroj de diversaj sendintoj.<sup>4</sup> Tiu stilo ne apartenis nur al tiu tempo. Sekve al la estraraj elektoj en 1996, en cirkuleraĵoj leteroj senditaj de akademiano al ĉiuj gekolegoj estas troveblaj insultoj kontraŭ elstaraj esperantistoj (foirana kliko, servutuloj, koterio, skismiga kampanjo, konkera kampanjo, obeema plenumanto, pajlohomino k. m. a.).<sup>5</sup>

Sed ni revenu al la participoj. La voĉdono por la estraro en 1962 kondukis al prezidanteco la francan profesoron Gaston Waringhien, kiu decidis alfronti (kaj decide alfrontis) la problemon. Por alpreni akademian decidon, la estraro proponis demandaron, kun jena motivigo:

*En la jam longa historio de nia lingvo nur du okazoj prezentiĝis, en kiuj gramatika diskuto ricevis vastan publikecon kaj dividis – kaj ĝis nun ankoraŭ plu dividas – la esperantistojn en du skolojn: la afero de la landnomaj sufiksoj kaj la afero de la participaj sufiksoj. Sed en tiuj ĉi du aferoj la pozicio de la demando ne estas ĝuste la sama.*

**Ĝi estas demonstra versio de la 73-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Jubileoj kaj memordatoj en marto 2018

**5.** Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Magomet Isajev** (Магомед Измайлович Исаев, Исаты Измаилы фырт Мæхæмæт, 1928-1956-2011), konata fakulo pri la iranaj lingvoj, sociolingvistiko kaj interlingvistiko, vicprezidanto de la Ruslanda Packomitato, prezidanto de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetuniaj E-istoj ĉe Unio de Societoj de Amikeco kun Eksterlando (1971-79), la unua kaj sola prezidanto de Asocio de Sovetiaj E-istoj (1979-89), vicprezidanto de MEM (1976-88), kunaŭtoro (kun Zinaida Semjonova) de la unua “vera” lernolibro de Esperanto eldonita en Sovetunio post la Dua Mondmilito (1984).

**6.** Antaŭ 25 jaroj mortis **Božidar Popović** (Божидар Поповић, 1913-1932-1993), serba/jugoslavia astronomo kaj esperantisto, direktoro de E-Instituto en Sarajevo (1958-62) kaj de Jugoslavia E-Instituto (1962-65), prezidanto de Jugoslavia E-Ligo (1969-79), komitatano (1953-77) kaj vicprezidanto (1973-74) de UEA, aŭtoro de populara E-lernolibro (kvar eldonoj ekde 1953), ĝenerala sekretario (1954-71) kaj prezidanto (1971-77) de ISAE, honora membro de UEA (1977).

**8.** Antaŭ 70 jaroj mortis **Edgar von Wahl** (1867-1887-1948), baltgermana instruisto, ruslanda mararmea oficiro kaj interlingvisto, pioniro de Volapük kaj Esperanto, aŭtoro kaj tradukanto (interalie, de *Princ(id)ino Mary* de Lermontov en 1889), forlasinta Esperanton pro nerealigo de reformoj, kunlaboranto de la interlingvistika revuo *Kosmoglott*, aŭtoro de la planlingvo Occidental (1922) post lia morto konata kiel Interlingue.

**23.** Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Antanas Poška** (1903-1913-1992), litova kaj sovetunia antropologo, arkeologo, vojaĝanto, ĵurnalisto kaj esperantisto; li realigis siajn vojaĝojn per Esperanto, parolis en E-programoj de Litovia Radio (Kaŭno), estis prezidanto de Litova E-Asocio antaŭ ties likvido en 1940, prezidanto de la Vilna E-klubo en la 1960aj jaroj.

**26.** Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Charles Lemaire** (1863-1897-1926), belga oficiro, kolonia administristo en Afriko, vojaĝanto, verkisto, direktoro de la Kolonia Altlernejo (Antverpeno) kaj esperantisto, fondinto kaj financinto de *Belga Sonorilo* (1902), la unua prezidanto de la Belga E-Ligo (1905-08), idisto ekde 1908. Omaĝe al li estas nomita la plej granda turisma allogaĵo de Antarkto – markolo Lemaire.

**28.** Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Ernest Archdeacon** (1863-1908-1950), franca inventisto, aviadisto, aŭtomobilisto, populariganto de tekniko, mecenato kaj esperantisto, prezidanto de la plej amasa kaj aktiva landa E-asocio en la intermilita periodo SFPE/UFE (1926-1945), aŭtoro de la ampleksa franclingva verko *Kial mi iĝis esperantisto* (kun antaŭparolo de Henri Farman); li ofte gastigis e-istojn en sia jaŭto *Esperanto*.

**28.** Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Hans Michael Maitzen** (1943-), aŭstria instruisto, astronomo kaj esperantisto, prezidanto de TEJO (1968-69), prezidanto de AIS (2012-16), preleganto en la Internacia Kongresa Universitato, kunlaboranto de la nova PIV (2002) pri astronomio kaj astrofiziko, reprezentanto de UEA ĉe la Viena oficejo de UN ekde 2012.

**Aleksander Korjenkov**

# Lingvo



Renkonte al ĉi-jara UK en la ĉefurbo de Portugalio ni proponas studon de Věra Barandovská-Frank pri kreoloj, kreĝintaj pro la portugala koloniado en Afriko, Azio kaj Ameriko.

(Sur la bildo: Vasco da Gama navigas, serĉante vojon al Hindio – ilustraĵo de Ernesto Casanova por *La Luzidoj*, 1880;

<https://pt.wikipedia.org/wiki/Ficheiro:Vascodagama.jpg>)

# Tutmondiĝo de portugaliaj kulturo kaj lingvo: Kien nun, kreoloj? (1)

de Věra Barandovská-Frank

Ĉi-jara UK-lando Portugalio posedis la plej longdaŭran kaj ampleksan kolonian imperion tra la tuta mondo: sescento da jaroj pasis inter konkero de Ceuta en 1415 kaj forlaso de Makao en 1999; la portugaliaj kulturo kaj lingvo disvastiĝis sur la teritorio okupata nun de pli ol kvindek memstaraj landoj. La monumento de malkovroj en Lisbono rememorigas famajn navigistojn, esploristojn, kartografojn, misiistojn, pentristojn, historiistojn kaj regantojn, grave kontribuintaj al tio, ke la Portugala estis lingvo de administrado kaj komerco, de misiado kaj lernejoj, instrumento de alfabetigo kaj klerigo. La indiĝenaj lingvoj, kiuj plej ofte ne posedis skribon kaj fiksan gramatikon, estis studataj kaj priskribataj de portugaliaj kleruloj. Aliflanke, el kontaktoj de la kolonia Portugala kun lingvoj afrikaj, amerikaj, aziaj kaj polineziaj naskiĝis kreoloj – etaj juveloj de spontanea interlingvistika evoluo. Ekzistis ĉ. kvindeko da ili.

Komence ili estis rigardataj kiel malperfektaj. Serioza scienca intereso komenciĝis en 1882 kun publikigo de “Kreolische Studien” de romanisto Hugo Schuchardt, kiu i.a. priskribis la afro-portugalan Santomé kaj la malajo-portugaliajn kreolojn de Batavio kaj Tugu. La plej freŝa sukceso de kreolistiko estas la oksforda *Atlas of Pidgin and Creole Language Structures* (2013) kun detala priskribo de 14 portugalecaj kreoloj.

Malgraŭ tio, ilia estonteco estas malcerta, ĉar ili ne havas oficialan statuson, kvankam en landoj kiel Gvineo Bisaŭa, Kaboverdo kaj Santomeo k. Principeo ili estas denaskaj de la plejmulto de loĝantaro, kiu devas lerni la oficialan Portugalan en lernejoj. Alie, ekz. en Barato, Sri Lanko, Indonezio kaj Makao ili estas uzataj de malgrandaj lingvokomunumoj. Pro praktikaj kialoj, la parolantoj de kreoloj preferas lerni la grandajn lingvojn, kiel la Anglan. Kien nun, kreoloj? Ĉu vi baldaŭ estos konataj nur el lingvistikaj priskriboj, kiel la iam florinta Batava, aŭ ĉu vi sukcesos oficialiĝi, kiel nun strebas ekz. la Kaboverda?

## 1. Historia superrigardo

La portugala imperio, kiu ekzistis dum sescento da jaroj, estis la plej malnova kaj la plej granda inter eŭropaj koloniaj kompleksoj. La monumento de malkovroj en Lisbono rememorigas tiujn, kiuj helpis starigi kaj disvolvi ĝin. La monumento





Figuro 1: Konkero de Ceuta.

<http://www.crossingtheoceansea.com/OceanSeaPages/OS-35-HenryNavigator.html>

havas formon de tipa velŝipo – karavelo, sur kies bordo la portugaloj aŭdace navigis ekde la 15-a jc. La persono sur la ferdeka pruo estas „Henriko la Navigisto“ (O Infante Dom Henrique de Avis, Duque de Viseu<sup>1</sup>, 1394-1460), sub kies gvido okazis en 1415 la konkero de Ceuta – la fondoŝtono de la imperio.

Ceuta (Sebta), tiam riĉa araba urbo sur la afrika flanko de Gibraltaro (nun en Maroko), pordego al Atlantiko, kontrolis navigadon kaj komercon kun varoj portataj de karavanoj el Azio. La konkero de tiu ĉi grava strategia punkto startigis esplorajn kaj ekspansiajn vojaĝojn de portugaloj – jam en 1418 ili malkovris insularon de Madeira, en 1427 Azorojn; en 1458 kaj 1471 ili konkeris pluajn afrikajn urbojn Ksar es-Seghir, Arzila kaj Tanger. Samtempe ili atingis Gvinean Golfon, fondis tie fortikaĵon Elmina kaj starigis komercajn kontaktojn kun Kongo. En 1488, Bartolomeo Dias ĉirkaŭnavigis la Kabon de Bona Espero en la sudafrika marbordo kaj eniris la Hindian Oceanon.

Kiam Kristoforo Kolumbo, taskigite de Reĝlando Kastilio, atingis Amerikon en 1492, hispanoj iĝis gravaj marpotencaj rivaloj de Portugalio. Tial la portugala reĝo Johano la Dua kaj la reĝoj hispanaj (Isabel kaj Fernando de Kastilio kaj Aragono) en 1494 subskribis dokumenton (Tractado de Tordesillas), per kiu ili dividis inter si la mondon en du esplor-areojn laŭ meridiano situanta inter Kaboverdo kaj Karibio. La okcidentaj teritorioj (Ameriko) iĝis hispanaj, la orientaj (Afriko, Azio) portugalaj. Dum pluaj traktadoj la portugaloj sukcesis ŝovi la limlinion ĉ. 100 km okcidenten tiel, ke ili povis parte okupi Brazilon. Tuj en 1498, Vasco da Gama atingis Hindion kaj en 1500 Pedro Álvares Cabral venis al Brazilo (opiniante ĝin insulo, li nomis ĝin “Ilha da vera cruz”). En la 16-a jarcento, portugalaj navigistoj esploradis la marbordon kaj insularon de Azio kaj fondadis tie fortikaĵojn, servantaj por kontrolo de trafiko kaj komerco. En 1571, la sistemo de administraj kaj ŝipkomercaj kontaktcentroj (faktorioj, portugale „feitorias“), kiu stabiliĝis laŭlonge de marbordoj de Afriko, Mezoriento, Hindio kaj Azio, etendiĝis ekde Portugalio ĝis Nagasaki en Japanio.



Figuro 2: Portugala influo en la 16-a jc.

[http://www.japassei.pt/artigo.aspx?lang=pt&id\\_object=1547](http://www.japassei.pt/artigo.aspx?lang=pt&id_object=1547)

Dum tiu tempo, la portugalaj reĝoj, kiuj havis parencajn rilatojn kun reĝoj hispanaj, sukcesadis elstari en la konkurenco kontraŭ Hispanio kaj certigi prosperon al la Portugala Imperio. La ĝistiaman gloran historion de la portugala nacio, famiĝinta per siaj malkovraj vojaĝoj tra la tuta mondo, priskribis verkisto Luís Vaz de Camões en sia fama eposo *Os Lusíadas* (1572, en Esperanto-traduko: *La Luzidoj*, 1980). Malbonŝance, la lasta reĝo de la portugala Avis-dinastio, 24-jara Sebastiano, malvenkis kaj mem perdiĝis dum la tragedia batalo kontraŭ Araboj ĉe Alcazarquivir en Maroko en la jaro 1578. La regnon portempe transprenis lia onklo, kardinalo Henriko; kiel religiulo li ne rajtis edziĝi kaj zorgi pri natura kontinuo de la reĝa linio. Kiel reĝ-kandidatoj ofertigis liaj du nevoj: Antonio (la kuzo de la malaperinta reĝo Sebastiano) kaj kastilia reĝo Filipo la Dua. Henriko faris la fatalan decidon, kiu por jarcento (1580-1640) unuigis Portugalion kaj Hispanion.

Tio malfortigis la pozicion de Portugalio en la kolonioj: tiuj estis unue transprenataj de hispanoj, kaj poste iĝis malkapablaj kontraŭstari konkurencon de novaj navigad-potencoj Nederlando, Francio kaj Britio. Jam en la 17-a jarcento, Portugalio perdis sian komercan monopolon en Hinda Oceano favore al nederlandanoj. La plej granda portugala kolonio restis Brazilo, kiu prosperis pro plantado de sukero kaj ekspluatado de oro en la 18-a jc. La okupo de Portugalio per trupoj de Napoleono en 1807 igis la portugalan kortegon fuĝi al Brazilo kaj proklami Rio de Janeiro ĉefurbo de Portugalio. La forta influo de portugalaj kulturo kaj lingvo kreskigis nacian konscion en la nova lando, kiu en 1822 (post reveno de la reĝo Johano la Sesa al Lisbono) sendependiĝis.

**Ĝi estas demonstra versio de la 73-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Kulturo*



**Okaze de la Virinfesto, kiun la 8an de marto oni festas en multaj landoj, ni publikigas versaĵojn de kvar ruslingvaj poetinoj, kiujn tradukis nia Moskva kunlaborantino Ludmila Novikova. Sur la titolpaĝo de ĉi-foja kulturekcio estas la pentraĵo “Marto” (1895) de Isaak Levitan.**

## Bella Aĥmadulina

\* \* \*

Dum pluraj jaroj desur mia strat'  
amikaj paŝoj sonas kaj forsvenas.  
Kaj la nekomprenebla forpasad'  
al transfenestra sombro plenkonvenas.

Malplenas domoj de la amikar',  
dissonos tie la muzik' neniam,  
kaj nur la bluknabinoj de *Degas*  
ordigas siajn plumojn, kiel ĉiam.

Ho ve, ho ve, do ne obsedu tim'  
dumnokte vin, gracilajn, sen la gardo.  
Amikoj miaj, al perfid' inklin'  
nebulas nun en viaj transrigardoj.

Ho, solsolec'! Kun kruda karakter',  
per la cirkelo fride scintilante,  
vi ŝiras vivan cirklon per la fer',  
senhelpan mian peton ignorante.

Do ree voku kaj benadu min!  
Mi, via favorito plenfidela,  
konsolos min ĉe via ama sin'  
kaj lavos min per via bluo gela.

Allasu min en via densarbar'  
piedopinti kun la gesto lanta,  
alpremi foliaron kaj per flar'  
eksenti min orfino plenbeata.

Donacu pacon de bibliotek'  
kaj de koncertoj melodiojn lunajn.  
Prudentoplena, mi memoros nek  
mortintojn, nek vivantojn nunajn.

Ekscios mi pri saĝo kaj malgaj',  
kaŝitan sencon montros la objektoj.  
Naturo alvizaĝe staros kaj  
al mi rakontos pri infansekretoj.

**Ĝi estas demonstra versio de la 73-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Patrino

## Rakonto de Julian Modest



La virino aperis ĉiam dum la granda interleciona paŭzo. Arjanov vidis ŝin de la fenestro sur la dua etaĝo. Nun, en la komenco de la printempo, ŝi ankoraŭ surhavis brunan vintran mantelon, larĝan, ne laŭ ŝiaj mezuroj. Ŝiaj longaj malhelaj haroj falis sur la ŝultrojn kiel flugiloj de hirundo. Videblis, ke ŝi estas bela. Ŝiaj grandaj helaj okuloj similis al maturaj orecaj vinberoj kaj ŝia vizaĝo estis iom pala kiel ĉina porcelano. Ŝia irmaniero memorigis la molajn movojn de kapreolo. Arjanov ne povis difini kiomjara estas la virino, eble tridek aŭ tridekkvin. Ŝi staris kun levita kapo ĉe la lerneja barilo, aŭ vagis tien reen ĉe la granda pordo. Ofte, oftege ŝi rigardis al lernejoj kaj atendis la eksonoron de la sonorilo por la interleciona paŭzo.

Vintre kaj printempe, post la eksonoro de la sonorilo la gelernantoj inundis la korton kiel malbarita rivero, kaj en la vasta areo kvazaŭ ekrapis sennombraj skaraboj. La virino, kiu staris ĉe la barilo, rekonsciiĝis, eniris la korton kaj ekiris, rigardante dekstren kaj maldekstren. Ŝi ĉirkaŭiris la korton, ŝovis sin inter la gelernantoj kaj finfine ŝi trovis tiun, kiun ŝi serĉis. Li estis Vasko de la sepa “bo” klaso, malalta, fragila knabo kun krispa hararo kaj brilaj okuloj kiel koloraj riveraj ŝtonetoj. La virino eltiris lin flanken kaj longe ŝi parolis ion al li. Kun klinita kapo, senmova, Vasko aŭskultis ŝin. Kiam la sonorilo denove eksonoris por memorigi la lernantojn, ke la interleciona paŭzo finiĝis, Vasko kun aliaj knaboj ekiris al la lerneja konstruaĵo. Liaj samklasanoj komencis primoki lin, nomis lin “la fileto de panjo” kaj “bebo”, sed Vasko silentis, rigardis teren, ŝvita kaj ruĝa kiel elektra forno. Larmoj plenigis liajn helajn okulojn, tamen li premis la dentojn kaj ne montris sian koleron. Ofte la infanoj estas ege kruelaj, – meditis Arjanov.

**Ĝi estas demonstra versio de la 73-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

## Malgranda ĉarma klasikaĵo

Saĥarov, Aleksandr Andrejeviĉ. *Superforta ambicio: Skizo el la esperantista vivo, originale verkita*: Bitlibro (pdf, ePub) / Postparolo de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2017. — 31 p. — (Literatura suplemento al La Ondo de Esperanto, 2017).

*La Ondo de Esperanto* faris belan donacon al siaj legantoj – elektronikan version de la noveo de A. A. Saĥarov *Superforta ambicio* (Moskvo, 1913; faksimila reeldono de *Sezonoj*, 1992). Donaco valora, ĉar la novelo apartenas al nepre konindaj por ĉiu Esperantaj klasikaĵoj.

A. A. Saĥarov lasis neforviŝeblan spuron en la movada historio kiel fondinto kaj redaktoro de la plej bona en la komenco de la 20a jarcento rusia Esperanto-revuo *La Ondo de Esperanto*, kiel eldonisto de Esperantaj libroj, kiel fondinto kaj animo de Instituto de Esperanto, kiel instruisto kaj kiel aŭtoro de plurfoje reeldonitaj lerniloj. Li estis ankaŭ tre bona verkisto, sed, bedaŭrinde, li ne disvolvis tiun sian potencialon, ĉar li estas aŭtoro nur de tiu ĉi malgranda beletraĵo kaj, krome, de rememoroj, aperintaj 50 jarojn post lia morto...

Malgraŭ la beletra malfekundeco, *Superforta ambicio* fariĝis grava evento por nia literaturo. Ĝi rakontas pri la rusa socio kaj pri loko en ĝi de la frua Esperantomovado. Ĝi aperis en la lasta “paca jaro” 1913, tiel ĝi konserviĝis en la popola memoro (ja sekvajare komenciĝis la Unua Mondmilito, kiun sekvis revolucioj kaj ceteraj perturboj), kaj tial iom resumas la staton de tiu periodo. Ĝi estas novelo samtempe psikologia kaj ironia (aŭ mole satira), verkita en bona kaj tute libera stilo en la periodo, kiam la originala Esperanta prozo ankoraŭ troviĝis en lulilo. Interesa detalo: kvankam la ĉefa protagonisto estas, evidente, persono negativa – ne hazarde li havas la parolantan nomon Parazitov – en lia biografio ni povas vidi kelkajn aŭtobiografiajn trajtojn de Saĥarov mem (deveno de “simpla” familio kaj devo kontraŭstari en la gimnazio nobelidojn kaj riĉulidojn; forpelo el universitato pro partopreno en studenta ribelo, ktp.). Sed, kompreneble, post la esperantistiĝo la kondutoj kaj sortoj de la aŭtoro kaj protagonisto plene diverĝas.

En la teksto estas kelkaj realismaj detaletoj, ironie karakterizantaj la rusan socion en tiuj jaroj, ekzemple: “Dum la pasinta jaro la rusa popolo kondutis bonege. Post la revolucio [de 1905-07 – NG] ĝi drinkis, kiel neniam antaŭe, kaj propravole pagis al la regna kaso kvincent milionojn da akcizo. Dank’ al tio, ĉiu akciza oficisto estis premiita per sumo de duonjara salajro” (p. 4). Ĉarme! Kaj, kompreneble, estas prezentitaj interesaj motivoj de esperantistiĝo kaj tipoj de esperantistoj en tiu epoko.

Oni ofte akuzas la gvidantojn de SEU de la 1920-30aj jaroj, ke ili faris el la esperantista organizo ion similan laŭ principoj de funkciado al komunista partio. Sed en



letero de d-ro Telegrafo al Parazitov ni povas vidi absolute ĉiujn tiujn principojn – unuanima sekvo al la komuna celo, demokratia centrismo, hierarkia strukturo, rigora disciplino... (p. 23) Evidentas, ke tiuepoke la aferoj apartenis al la ĝenerala spirito de civitana socio, sendepende de konkreta ideologio, el kies adeptoj konsistis iu certa societo. Scio de tio gravas por hermeneŭtika kompreno de tiu historia epoko!

Ne kapabla atingi ion, kio respondus al liaj ambicioj, Parazitov transiras al Ido – kaj ricevas mokon, ke nur idiotoj povas fariĝi idistoj (p. 24). Sonas nun iom banale, sed aktuale por tiu periodo, kiam Ido ankoraŭ ŝajnis esti io danĝera.

La lingvaĵo estas preskaŭ senriproĉa kaj moderna, iuj arkaismoj apenaŭ senteblas – eble, iom tranĉas la okulon la esprimo “okupiĝi per io” (anstataŭ “pri”). Do, eĉ tio ne malhelpas facile tralegi la libreton. Do, nepre ĝuu ĝin!

**Nikolao Gudskov**

## JoMo invitas al la okcitana karnavalo

**JoMo okcitanas: K-disko. – Donneville: Vinilkosmo, 2016.**



Jean-Marc Leclercq (konata ankaŭ kiel JoMo) verŝajne ne bezonas eĉ mallongan prezenton por la esperantistoj. Multaj konas kaj ŝatas lin pro liaj brilaj prezentoj de plej diversstilaj kaj diverslingvaj kantoj, per kio li akiris la famon de siaspeca “pop-stelulo” de Esperantujo. Tamen lin interresas ne nur la populara kant-arto, sed ankaŭ la relative malmulte konataj kantaj kulturoj de diversaj popoloj. En sia antaŭa disko *JoMo slavumas* li jam donis multe da atento al la jida, cigana, ukraina kaj rusa kantaj tradicioj, jen do venis la tempo por turni sin al la okcitana.

Necesas diri, ke la tradiciaj okcitanaj kantoj estas bone prezentitaj en la Esperanto-mondo: sufiĉas rememori nur pri la belegaj albumoj de la grupo *Kaj Tiel Plu* aŭ pri la antaŭnelonga albumo *Okcitanio* de Patric. Mi do havis ioman antaŭtimon, ĉu JoMo sukcesos digne konkurenci kun la jam ekzistantaj ekzemploj. Feliĉe, talento al JoMo sufiĉas; krome, por sia nova albumo li utiligis originalan allogaĵon – la uzon de la tradicia okcitana muzikilo *bodego*, pri kio al li helpis la membroj de la grupo *Brankabodegaires* (Bodegistoj).


**Ĝi estas demonstra versio de la 73-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Mozaiko*

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.





# Spritaj splitoj kaj preskeraroj

## *El la kolekto de reduktoro*

### *Ĉu kokrcinelo?*

La Longa Kornhava Skarabo... Bedaŭrinde la longa kokrita skarabo pli minacatas ol povas minaci... (7 *Demonecaj Bestoj // Kontakto*, 2017, N<sup>o</sup>1, p. 18; trovis Russ Williams)

### *Ĝene elreliĝis*

En novembro la estraro de UEA anoncis, ke la ĝenrela direktoro de la asocio, Veronika Poór, forlasos sian postenon fine de la jaro 2017. (<http://www.liberafolio.org/2018/02/08/aleks-kadar-nova-generalasekretario-de-uea>, konsultita 8 feb 2018)

### *Plia ĝeneralo, aŭ: Elokventa grasulino*

Alphadi estis kiel artisto de paco nomumita de la ĝenerala direktoro de Unesko Irina Bokova, Parizo 2016. (*Unesko-Kuriero*, 2017, N<sup>o</sup>1, p.52, fotoklarigo)

### *Kostaj studoj*

En 1994, la Prezo de ekonomiaj sciencoj memore al Alfred Nobel montris la gravecon de liaj laboroj en la matematika apliko je la ekonomio de la „teorio de ludoj”. (Pierre Dieumegard, sekretario de Eŭropo-Demokratio-Esperanto, 8 sep 2016, <http://e-d-e.org/Reinhard-Selten-2016-09-02?lang=eo>)

### *La rajto ĝeni*

Deklaro pri la rajtoj de la indeĝenaj popoloj (Yokoyama Hiroyuki: *Pri la nuna stato de aina lingvo*, [http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jek99/ajnua\\_lingvo/Pri\\_la\\_nuna\\_stato\\_de\\_ajnua\\_lingvo.pdf](http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jek99/ajnua_lingvo/Pri_la_nuna_stato_de_ajnua_lingvo.pdf))

### *Lin kontrolas akuzativon*

Go Yong-seok (Kontraŭ) Meditisto, Vegetalisto, Li havas kapablo kontroli komputilon. (*TERanidO: Bulteno de Busan-Gyeongnam Filio de Korea Esperanto-Asocio*, 2016, N<sup>o</sup>7-8, p. 2)

### *Ĉu demeti la ĉapelon antaŭ donemuloj?*

Usonanoj povas ricevi rabaton kontraŭ la impoŝtoj por mondanaĉo... (Steven D. Brewer: *Pri la Boschen Kolekto*, 13 aŭg 2016, [blog.bierfaristo.com/node/799](http://blog.bierfaristo.com/node/799))

### *Kokteliĝas pacaj talantoj*

PETRONEL HOJBOTA, Rumanio (Premio pri juna talanto) (*Poezia kaj humura antologio "Abritus" – premiitaj verkoj de la Internacia Literatura konkurso EKRA 1991–2015*. Razgrad: Esperantista Domo pri Kulturo "D-ro Ivan Kirĉev", 2016, p. 52; rimarkis Ionel Oneț)

Plukis **István Ertl**

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

## Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

**Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: [rosar@fibertel.com.ar](mailto:rosar@fibertel.com.ar).

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: [libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au).

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at).

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br).

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk)

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg).

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: [Cea.polnicky@quick.cz](mailto:Cea.polnicky@quick.cz).

**Ĉinio:** Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsu, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: [agrikulturo@126.com](mailto:agrikulturo@126.com).

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: [arne-casper@email.dk](mailto:arne-casper@email.dk).

**Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee).

**Finnlando:** EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com).

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org).

**Germanio:** Wolfgang Schwanzner, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: [libroj@esperanto-buecher.de](mailto:libroj@esperanto-buecher.de).

**Hispanio:** Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hiperanto.uea@terra.com.

**Hungario:** Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

**Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

**Katalunio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

**Meksiko:** Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

**Nederlando:** Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

**Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

**Nov-Zelando:** G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

**Pollando:** Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

**Ruslando:** Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

**Serbio:** Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

**Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch\_scheidegger@bluewin.ch.

**Usono:** Esperanto-USA, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

*Neniam sendu monon en kovertoj!*

**30-a Internacia  
Esperanto-Konferenco**



**Temo:**

# **ESPERANTO EN ARTOJ**

**21-a ĝis 27-a julio 2018  
en kastelo Grésillon (Francio)**



**Riĉaj prelega, kultura  
kaj turisma programoj**

**Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe:  
[osiek.org/iek](http://osiek.org/iek)**



## LIPTOVSKÝ MIKULÁŠ (SK) 14 - 22 JULIO 2018

Venu sperti la plej mojosan someran Esperanto-lernejon!

Somera Esperanto-Studado (SES) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj kun riĉa distra programo.

► Por informoj kaj aliĝo vizitu: <http://ses.ikso.net>



# 103-a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, 28 julio - 4 aŭgusto 2018

